

Kara Samideano + Amiko,

Vi ne povas imagi la ĝojon mi spertis vidante la konitan manskribon. Sed kiel ĉiam, tiu ĝojo estas kunmiksita je bedaŭro ĉar vi neniam plu skribas. Dum 1926, mi ne ricevis iun ajn leteron, sed 2 P.K., unu en Feb. + alian en Aprilo. Viaj leteroj estis ĉiam granda ĝojo por mi, vi diras ke miaj estis same por vi + vi, vole forstreki tiujn ambaŭ ĝojojn. Sed, legante vian animstaton laŭ via letero, mi iom komprenas kial vi rifuzis tiun ĝojon al ni ambaŭ. Estas, ŝajne, ĉar vi ne havas la sufiĉan energion por komenci la leteron, + vi prokrastas, prokrastas + prokrastas tiel longe ke via senmovanta animo al kutimiĝas facile al la prokrasto. Vi bezonas mensan ŝanĝon, mi kredas + por tio vi eble bezonas materialan ŝanĝon. En franca lingvo estas "slanga" vorto kiu priskribus vian staton: "Vous vous encroûtez." Eble vi ne komprenos. En tiu senco tio signifas ke "vi enfermas vin en krustaĉo". Vi senkulpigos tiujn vortojn, ĉu ne?

Via animo kiu estas malkontenta serĉas + serĉas + nenion trovas, vi ekprovis du religiojn, neniu el ili kontentigas vian inteligentan menson. Vi serĉas animkvietecon en religioj faritaj de la homoj - ĉu estas saĝe? Ĉu ne estus pli facile, pli vere + pli certe serĉi ĝin en via propra intelekto, en via vivado, en viaj agadoj, en via propra ideo de la bono + de la malbono.

Ĝis nun mi preskaŭ ĉiam rimarkis ke malbonaj malkvietaj animstatoj devenas el malbonaj fizikaj statoj. Sendube ke vi ne eliras sufiĉe, ke vi ne faras sportojn dum la longa vintro, ke vi restas tro longtempe sidita je via skribtablo sen freŝa aero. Eble vi manĝas bone, eble tro por la laboro fizika kiun faras viaj muskoloj + sekve, via hepato igas vin mense malkontenta.

Tamen, ĉio ne estas fizika + materiala + via animo bezonas ŝanĝon. Ĉu vi ne povas fari vojaĝon ... ĝis Praha, ĝis Parizo, ĝis - Boulogno?

Al vi ŝajnas ke nia vivo havas pli altan celon. Eble ne, eble jes. Sed, vi neniam scios tion - kial do perdi tempon ĝin serĉi. Vi dubas pri ĉio + vi kredas al neniu!! Malĝoja konfeso! sed, mi kredas ke vi pligrandigas ĉion. Vi kredas al Eveto, al via amo por ŝi, al ŝia nuna amo por vi; vi kredas al la amikeco, ĉu ne? vi kredas al la simpatio de amikoj, ĉu ne? (via letero lasta pruvis tion), vi kredas al la beleco, beleco de la naturo, de la muziko, de la floroj, de la suno. Vi admiras<sup>1</sup> ĉion kio estas bela, do vi kredas al la beleco.

Vi petas mian pardonon ĉar vi timis enui min sed, vere, vi scias bonege ke vi ne enuus min. Tute kontraŭe, do vi kredas + fidas al la amikeco + al la simpatio. Vi skribas ke la homoj estas ĉiam malkontentaj, sed kiam ili donas feliĉon al amataj simpatiaj estaĵoj, ĉu ili mem ne estas feliĉaj?

Sed, mi ŝajnas fari kurson da filozofio al vi kiu certe estas pli lerta ol mi pri tio. Vi petas ke mi donos<sup>2</sup> novan filozofion kiu konsolus vian animon - tio ne estas ebla ĉar ĉiuj filozofioj estas malnovaj, sed estas la maniero praktiki ilin kiu povus esti nova. Do, mi konsilos al vi "Lasu vin vivi trankvile, zorgu vian korpon, amuziĝu iom pli, eliru multe, leviĝu frue + ĝuu pli la naturon .. + skribu al mi - ĉar mi komprenas." Venu Antverpenon en 1928 + mi revidos vin.

En Francujo, oni forprenis 228 tribunalojn po<sup>3</sup> 350 por fari ŝparojn !!! Vi povas imagi la

---

<sup>1</sup> ĉu "admiras" ?

<sup>2</sup> ĉu "donu" ?

<sup>3</sup> ĉu devus esti "el" ?

sekvantaĵojn konsekvencojn: preskaŭ ruino por multaj advokatoj + "avoués"<sup>4</sup> k.t.p. Feliĉe, Boulogne restis.

Mia filo vivos<sup>5</sup> en Montreuil s/Maro el kie oni forprenis la tribunalon. Li do venos en Boulognon 2 foje po semajno en aŭtomobilo sia. Li nun estas en Cannes.

Pri aŭtoj, ĉu vi ne povas aĉeti unu? estas la plej granda kuracilo por ĉiu speco de anima malkvieteco. Ni havas unu "Renault" 4 lokoj, fermita + estas la plej granda plezuro + amuzo de mia edzo. Certe, ne estas fizika laboro por la muskoloj, sed la mensa intereso estas tiel granda konduki + zorgi pri ĝi.

Mi ne sciis ke la 24<sup>a</sup> de Dec. estis festtagoj de Adam + Evo. Kion vi volas diri?

Ni estis en grandaj baloj + mi multe dancis. Ĉu vi rememoras la balon en Praha en 1924?

Vi skribas ke via labora estas ĉiutage sama, stereotipa, unutona - sed ĉu ne estas same por ĉiu, aŭ preskaŭ ĉiuj? Ĉu vi ne povas enmeti pli da intereso en vian laboron? per vi mem? Estas tamen kelkaj procesoj kiuj estas plenaj da<sup>6</sup> intereso, da diskutadoj, ĉu ne?

Sunkulpigu min se mi ŝajnus doni tro da konsiloj al vi. Tre eble ili malkontentigos vin ĉar vi diros ke mi miksis tro la materialon kun la animo. Sed ili estas kvankam<sup>7</sup> tre praktikaj venintaj el la koro + tial vi povas akcepti ilin.

Mi legas pri via belega<sup>8</sup> Prahaj ~~skolta~~ sokolaj festoj + mi bedaŭris multe ne ĉeesti.

Mi jam korespondadis kun la filino de D<sup>ro</sup> S. Schulhof + ŝi skribis ke ŝi vin konas. Sed, nun mi ne havas novajn korespondantojn.

Do, nun, mi skribis sufiĉe + mi esperas ke mi ne tedis vin + mi petegas vin, se via animstato sentas la bezonon skribi tion kion vi sentas, ne ĝenu vin + mi ĉiam estos simpatia + komprenanta.

Mia edzo petas min sendi siajn bondezirojn por 1927.

Al vi mi sendas miajn amikajn sentojn esperante ke vi tamen trovos sufiĉe da energio dum 1/4 da horo, de tempo al tempo, skribi al via korespondantino.

Alice Sergeant

9

---

<sup>4</sup> státní zástupce

<sup>5</sup> ĉu "vivas" ?

<sup>6</sup> ĉu "de" ?

<sup>7</sup> ??

<sup>8</sup> ĉu "belegaj" ?

<sup>9</sup> Komento komence de la lasta paĝo: " Senkulpigu tiun folion. Mi ne atentis ke aliflanke estis io jam skribita + mi ne havas tempon rekomenci. Thanks."